Gazeto Andaluzia

ANDALUZIO PER SI, POR HISPANIO KAJ LA HOMARO

N° 24 * 6-a Jarkolekto * AŬGUSTO '89

VENU KAJ PARTOPRENU KUN NI !

Torrox

12-a / 15-a Oktobro 1989

7a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

HORIZONTALE.–

1.- Aparato por trassendi mesagojn gis granda distanco. Persona Pronomo.
2.- Vokalo. Adverbe, malplezuro pro senintereso aŭ neokupiteco. Vokalo. Adverbo uzata por insisti pri identeco de la koncernata persono aŭ afero.
3.- Parto de armeo konsistanta el kelkaj batalionoj. Du malsamaj vokaloj.
4.- Konsonanto. Sustantive, movigi de iu loko al alia. Inverse, Vitra vazo por trinki.
5.- Konscie ekvoli fari ion en nedifinita tempo. Eligi laŭtajn akrajn voĉsonojn.
6.- Vokalo. Inverse, adverbo por plifortigi aserton. Imagi. Konsonanto.
7.- Du malsamajn vokaloj. Sufikso uzata por derivi numeralojn. Sen la lasta vokalo, organa korpo produktata kaj eligata de la inoj de diversaj klasoj de bestoj. Sen la lasta vokalo, malŝate ridindigi iun aŭ ion.
8.- Nomo de konsonanto. Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo. Vokalo. Vokalo. Vokalo.
9.- Lavumo. Vokalo. Inverse kaj akuzative, kavaĵo.
10.- Vokalo. Ĉio kio estas perceptebla per sentumoj. Sufikso esprimanta kolekton de samspecaj estuloj aŭ objektoj.
11.- Inverse, regnestro de islamaj landoj. Vokalo. Tri vokaloj.
12.- Vokalo kaj konsonanto. Nevole forta streĉo de la muskoloj.
13.- Konjukcio uzata post supereca aŭ malsupereca komparativo. Duonsfera konstruo en formo de renversita kaliko. Konsonanto.
14.- Strio el ŝtofo aŭ ledo por ĉirkaŭigi la talion. Vokalo. Sciigo al la publiko presita sur papero kaj gluita sur muro.
15.- Inverse, ligilo el interkunigitaj ringoj. Konsonanto. Vokalo kaj du konsonantoj.
16.- Konsonanto. Objekto respektegata kiel sidejo de magia povo. Prepozicio.
17.- Inverse, nomo de litero. Nomo de litero. Inverse, gluti fluaĵon.
18.- Inverse kaj adjektive, hindua sistemo de filozofia meditado. Adverbe, batalilo konsistanta el longa ligna stango kun akra ferpinto.
19.- Persona nedifinita pronomo. Inverse, germana dialekto miksita de hebreaj kaj slavaj vortoj. Unuo de elektra rezistanco de kondukilo.
20.- Vokalo. Homo kies metio estas rajdi en ĉevalaj vetkuroj. Adverbe, plifortigi jesadon.

VERTIKALE.–

1.- Insekto kiel la formiko kiu mangas lignon. Cina filozofio. Gaso. Du malsamaj vokaloj.
2.- Vokalo. Vokalo. Konsonanto. Utiligu. Idon. Inverse, numero.
3.- La libro estas _____ de mi. Inverse, hakfosilo. Inverse kaj sen la lasta vokalo varma suda vento. Inverse kaj sen la lasta vokalo, ludo konsistanta kunmeti pecojn por refari bildon.
4.- Loko por eniri. Sufikso uzata por derivi numeralojn. Kaleŝkonduktisto. Vokalo.
5.- Akuzative, glua suko el iaj arboj. Maljes. Malne. Vokalo. Inverse kaj sen la lasta vokalo, amerika besto simila al eŭropa lupo.
6.- Adverbe, sufikso esprimanta ripeton. Neuzata persona pronomo. Denove sendi.Prepozicio.
7.- Vokalo. Konsonanto. Internacia lingvo. Numero. Prepozicio. Sudamerika Lando.
8.- Fotografaĵo. Povanta okazi, depende de necertaj cirkonstancoj. Inverse, ekstera vira vesto.
9.- Vokalo. Inverse, nomo de litero ne ekzistanta en Esperanto. Du samaj vokaloj. Kanapo kun dikaj kusenoj. Du samaj konsonantoj.
10.- Konsontanto. Sufikso signifanta kunigon de objektoj. Prefikso esprimanta eroran uzon. Inverse, Persona Pronomo. Signoj kiuj gvidas al io.
11.- Prahistoria epoko dum kiu oni uzadis la ilaron el polurita ŝtono.Du malsamaj vokaloj. Vokalo. Ema gardi por la estonteco.
12.- Ree prezenti al si en la spirito antaŭe viditajn bildojn. Granda ŝlosebla kesto. Nomo de litero. Konsonanto. Du malsimilaj vokaloj.

ĈEFARTIKOLO

Jus finiĝis la 7-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Eble tiu de ĉi tiu jaro estis iom malsimila al tiuj okazintaj en pasintaj jaroj, pro la fakto ke ni intencis plani nian agadon por la jaro 1990. Tiel, iuj asertis ke ja abundis la labor-kunvenoj dum la kongreso, tamen estas ne cese diri ke tiuj kunvenoj nepre devas esti la kerno de la kongreso, t. e. organizi la efikan disvastigon de la internacia lingvo Esperanto.

En ĉiuj vortaroj la vorto "*esperantisto*" aperas kun la signifo *"persono kiu parolas Esperanton kaj emas disvastigi la lingvon kaj ĝian idearon"*. Same tiu devus esti la naturo de ĉiuj ni kiel esperantistoj. Tiel ĉi karakteroj estos la gvid-linioj por la laboro de AEU. Unue ni intencas instrui la lingvon pli efike al la socio kaj al ni mem. Pro tio oni fondigos la Someran Esperanto-Lernejon, por perfektigi nian propran parol-kapablon. Same unuafoje post kelkaj jaroj, oni organizos en Andaluzio nombrajn elementajn kursojn, minimume 6 dum la venonta jaro, kaj oni eĉ proponis la ideon instrui la lingvon dum intensiva kurso en Torokso por profesoroj, ĉi tiu ideo realiĝos en la proksima monato Marto, kaj sendube estos efika por alportigi Esperanton al la lernejoj.

La dua ideo de ĉiuj labor-kunvenoj estis disvastigi la lingvon. Multnombraj estis la proponoj, do ne taŭgus simple mencii ilin ĉi tie, ni nur komentos kelkajn. Unue, ni ekkontaktis kun la organizantoj de la Universala Ekspozicio de 1992, ĝis nun ni atingis la eldonadon de broŝuro en Esperanto, tamen estas certa afero ke ĉi tio estas nur la komenco ĉar oni videblas eĉ partopreno pere de iu stando en la propra ekspozicio. Due, oni studis la mon-rimedojn atingeblajn por labori, tiel apud la ĉiamaj subvencioj oni proponis aliajn ideojn, kiuj se ili sukcesas ni atingos "ekonomian trankvilecon" por nia laboro. Trie oni metis la bazojn por la organizado de alloga turisma oferto al la tutmonda esperantistaro, ĉar ĉi tie en Torokso ni disponas je malmultekosta restadejo tuj apud la maro, taŭga por ĉiuj gesamideanoj kiuj deziras somerumi en esperantista etoso ĉe la marbordo. Same la oferto pri turismo pligrandiĝas por niaj propraj membroj ĉar ni deziras daŭrigi la ekskursojn por AEU-membroj aŭ simpatiantoj tra la tuta andaluzia geografio.

Kaj fine nur diri ke oni parolis pri multaj aliaj aferoj, inter ili pri la eldono de nia propra lerno-libro kaj la preparado de kurso de Esperanto per radio. Sendube temis pri labor-abunda kongreso, kies rezultoj realigeblos nur se ni estas esperantistoj, t.e. personoj kiuj parolas Esperanton kaj emas disvastigi la lingvon kaj ĝian idearon.

Kion vi atendas? AEU estas preta helpi ĉiajn ideojn por la sukcesigo de Esperanto.

INFORMOJ

KORDOVO

* La samideanaro de ĉi tiu urbo pripensas la eblecon organizi elementan E-kurson denove kun la kunlaboro de la Kordova Urbodomo pere de la Junulara Domo.

MALAGO

* Grupeto da gelernantoj kiuj finis la elementan E-kurson preparas nun la ILEI-ekzamenon kiu okazos en la Toroksa Kongreso. Sendube kelkaj el ĉi gelernantoj komencigos perfektigan kurson en la venonta monatoj.

TOROKSO

* Kiam niaj toroksaj samideanoj preparas ĉion rilata al la venonta andaluzia kongreso venis agrabla novaĵo, finfine la Toroksa Urbodomo pagis la promesitan subvencion okaze de la Kongreso de 1987. Sendube pravas la refreno "Pli bone malfrue ol neniam"

JEREZO

* Kaj reparolante pri monhelpoj la pasintan monaton Aŭguston ni ricevis tre agrablan novaĵon de la Jereza Grupo, finfine oni ricevis la subvencion promesita de la Kadiza Deputistaro okaze de la Kongreso de 1988. Tio ebligas monhelpi la lokan klubon kaj samtempe monrimede apogi nian regionan asocion.

SEVILJO

* En Julio la Junulara Departmento de la Andaluzia Registaro komunikis al SEJO (Sevilja Esperantista Junulara Organizo) la neceson forlasi la sidejon kiun ĉi sama departmento prunte donis al la junulara organizo antaŭ kelkaj monatoj. Surprize la peto, redaktita per vortoj kaj frazoj kiuj memorigas dikta durajn tempojn, ne oferis alian sidejon por daŭrigi la laboron. Jae, hontema afero kiu ne necesas pliajn komentariojn.

* Ĉu vi memoras *CIESREVUINO*-n la sevilja fanzino verkita en Esperanto? Vi povos ĝui ĝin denove ĉar SEJO, la eldonanta asocio, preparas novajn numerojn. Sendube ĉi nova epoko provokos santempe laŭdojn kaj kritikojn de la legantoj. Apogebla estas ĉia ideo eldoni en Esperanto.

* En la venonta monato Novembro komenciĝos en Seviljo du novaj elementaj kursoj, unu en la Sevilja Akademio de Esperanto, str. Sol 75 kaj la alia en la Junulara Domo "Villa Julita". Ni esperas pligrandigi la nombron de la sevilja esperantistaro.

TRADUKO DE LA VERKARO DE LORKA EN LA INTERNACIAN LINGVON ESPERANTO

Traduki la verkaron de Federico García Lorca en kiun ajn lingvon estas defio. Ni troviĝas ne nur antaŭ altkvalita poeto kaj teatr-aŭtoro sed ankaŭ antaŭ komplekta poezia fenomeno. "Mi nek manĝas, nek trinkas, nek komprenas ekster la Poezio", skribas Federico en 1926. Kaj poezio ne estas nur lia lirika verkaro sed ankaŭ lia teatro. Ĉi tiu kompleta simulo García Lorca-Poezio igas pli malfacila, laŭ miaopinie, la taskon translokigi taŭge la tutan komplekson kaj diversecon de sia poezia universo. La tradukanto ĉiuvorte, ĉiufraze, en ĉiu lorka elspiro, sentas sin invitata trovi ĝi tuj apud la mistero, en la plej alta regiono de la homa esprimo. Mi parolas pri Poezio majuskle. Kaj granda parto de tiu invito aperas per esprimoj ne nur andaluziaj, sed pli konkrete granadaj, de la Vego de Granado.

Federiko plenumigas ĉi-maniere la paradoksan proponon de nia andaluzia devizo "Andaluzio, per si, por Hispanio kaj la Homaro". Kaj ĉefe pro tiu celo komuniki, eniri en la mondon sen lingvaj muroj kaj baroj, siaj verkoj disvastiĝas tra la tutaj landoj, kaj la leganto aŭ la publiko pli lontana sentas l'on universalan kaj eternan, aŭ same dirita, l'on homan kio ekzistas en ĝi.

Do, estas konvena la traduko de la Lorka verkaro pere de tradukanto profunde enradikigita en la andaluzia animo kaj samtempe en internacia lingvo kun grandaj esprimaj rimedoj. Pro tio mi kiel granadano, amanto de la Lorka verkaro kaj de Esperanto kuraĝiĝis, perdinte miajn unuajn timojn, komencigi, humile kaj pasie, traduki tiujn du grandaj verkojn de la eŭropa teatro de ĉi jarcento: Sanga Nupto kaj La Domo de Bernarda Alba.

Lorka ne vestiĝas en popolaj vestoj, ne imitas la popolon. Li fariĝas popolo, diras la Profesoro Alvar, li estas popolo diras mi mem. Do kiel translokigi la popolajn esprimojn al alia lingvo? Estas necesa lingva sistemo kun riĉa esprima kapablo. Tiu lingvo, mi asertas, estas Esperanto. Kiam mi ekle-gis "Cigana Romancaro"-n en la traduko de Fernando de Diego, mi rapide serĉis la Romancon al la Civil-Gvardio, kaj konkrete tiujn du versojn kiuj diras:

"Cuando llegaba la noche
noche que noche nochera..."

En la dua verso la vorto "noche" ripetiĝas sub tri malsimilaj




gramatikaj formoj, kio fariĝas ilin preskaŭ ne-tradukeblajn. Tamen mi surprize legis:

"En la falo de la nokto
nokto, nokte, noktintima..."

Tiam mi komprenis la grandan valoron de Esperanto por la traduko de la verkaro de Lorka kaj rapide mi dediĉis mian studon al la proponoj de Fernando de Diego por plenumigi la taskon traduki "Sanga Nupto" kaj "La Domo de Bernarda Alba".

Kiam ni parolas pri la teatro de Lorka ni devas aserti ke ĝi estas tute kongrua kun la poeziaj verkoj. Sia teatro estas dramatika poezio. Li mem diras ke la teatro estas poezio kiu stariĝas el la libro kaj fariĝas homaspekta, kaj tiel la poezio parolas kaj krias. Kaj efektive "Sanga Nupto" kaj "La Domo de Bernarda Alba" estas ekzemploj de la teatro de Lorka. En ambaŭ la lingvo estas malmola, ne-facila kaj sen fendoj. Kaj malgraŭ tio ĝi apartenas tute al la popolo, al la vilaĝoj de la Vego de Granado.

En "Sanga Nupto" la tradukanto trovas tri formojn de lingvo. Unu e tiu kiu apartenas al la popolaj kantoj kun dramatika forto. Due, la lingvo de la dialogoj, kaj tri e tiu kiu karakterizas la tragedion. Tiel la tradukanto devas dum la tuta laboro diferencigi la saman lingvon. Kiu povus traduki kiel eble plej fidele la tutan aron da nuancoj, la senliman pasion, la universon de vivaj sentoj, sed tiu kiu havas ilin kiel propraĵn pro la naskiĝo, la sperto kaj la amo? Ĝenerale, la tradukanto tradukas el lingvo kiu ne estas propra, kaj tiel ne estas eble kapti la specifajn frazojn kaj vortojn. En Esperanto okazas inverse, la esperantista tradukanto rigardas unue la esprim-manieron de la aŭtoro, kiu apartenas al sia propra patrinlingvo. Do, necesas koni profunde, eĉ ami, kaj sufiĉa scipovo, por traduki ĝuste ĉiun vorton, ĉiun frazon, ĉiun elspiron, por tuŝi la plej aŭtentikan kordon de ĉiu aŭtoro.



Alie, la aglutina karaktero de Esperanto oferas senlimajn eblecojn por kunmeti vortojn kaj eĉ krei novajn vortojn laŭ la 16 reguloj de la Esperanto-gramatiko. Same la kolekto de refrenoj tradukitaj de Zamenhof mem, la ekzisto de Plena Ilustrita Vortaro, kies eldono partoprenis elstaraj figuroj de ĉiuj sci-kampoj kaj la monumenta Plena Analiza Gramatiko, oferas al ĉiuj tradukantoj certajn apogojn por plenumi fidindajn tradukojn de ĉiuj verkaĵoj.

Sed ni daŭrigu la temon de la traduko de la teatra verkaro de Federiko Garcia Lorka. En la Lorka teatro ekzistas versojn kiuj ludas dramatikan rolon. En "Sanga Nupto" aperas, ekzemple, 580 versoj en kiuj la poeto dis

volvigas ĉerte kaj image ĉiujn poeziajn rimedojn: la surrealismo ekzistanta en sia tuta verkaro, la kapablo sugesti, la mistera kaj erotika etoso, sia luma imagpovo, siaj kuraĝaj metaforoj.

Ĉio en la verkaro de Federiko Garcia Lorka estas poeziigi la muzikon aŭ muzikigi la poezion. Lorka estas Lorka, inter aliaj faktoj, pro la muziko kiu ekzistas en siaj poemoj. Pro tio mi proponis, kaj mi proponas, por traduki la poemojn de nia granda andaluzo "radiografii" siajn ritmajn skemojn kaj aljustigi ilin al la nova lingvo. Tiel mi tradukis la versojn en "Sanga Nupto" kaj "La Domo de Bernarda Alba", tiel mi tradukas nun la poemojn de "Divan del Tamarit", tiu senpara aro da profundaj sencoj, de angoroj preskaŭ fizikaj, kie palpas la plej aŭtentika voĉo de nia Federiko.

Tiel estas la poezio de Federi- Garcia Lorca en la internacia lingvo, tiel estas la poezia akcento kiun neniu povos murdi, ĉar ĝi jam inundas la korojn de la homoj en la plej lontanaj lokoj de nia planedo. Tiel, pro la forto de la homaro, sen defendantoj sen ploremulinoj. La Poezio de Federiko defendas sinmem. La verkaro de Federiko jam venkis la miton de lia murdo. Kaj nia Federiko jam estas la Federiko de la Mondo.

Ĉi artikolo estas resumo de la konferenco legita en Fuente-Vaqueros kies aŭtoro estas nia elstara samideano MIGUEL FERNANDEZ MARTIN. La originalon li redaktis hispanlingve kaj ĉi tie nur aperas tradukitan resumon. La kompletan tekston ni aperigos estontece.



INFO - SERVO DE A.E.U.

Andaluzia Esperanto-Unuigo ekorganizas telefonan servon por tiuj kiuj interesigas pri temoj rilataj al la internacia lingvo Esperanto, ĝia movado, eblecoj lerni kaj uzi ĝin, faktoj, agado en Andaluzio, ktp.

Se vi volas uzi ĉi servon telefonu al:

95-441-58-54

Tuj post la respondo diru: "*Info-Servo Esperanto*".

Horaro: De la 16a ĝis la 20a horo de lundo ĝis ĵaudo. (Bv. ne telefoni ekster ĉi konkretaj horoj kaj tagoj).

Lingvoj uzeblaj: Esperanto kaj la hispana.

* * * * * * * * * * * * * * *

La Asociación Andaluza de Esperanto va a organizar un servicio telefónico para todos aquellos que estén interesados en temas relacionados con la lengua internacional Esperanto, su movimiento, posibilidades de aprenderlo y de usarlo, hechos, actividad en Andalucía, etc.

Si desea utilizar este servicio telefonee al:

95-441-58-54

Inmediatamente después de la primera respuesta por favor diga: "*Info-Servo Esperanto*".

Horario: Desde las 16 hasta las 20 horas, de Lunes a Jueves. (Por favor no telefonee fuera de estas horas y días concretos).

Este servicio podrá utilizarse empleando bien el Esperanto o el Español.

ESPERANTO KAJ LA LIGO DE LA NACIOJ

Omaĝe al EDMOND PRIVAT
en la jarcento de sia naskiĝo

Tuj post la fino de la unua mondmilito la usona prezidanto S-ro Wilson proponis al la cetera-raj Statoj la fondigon de internacia organizo, kiu sub la nomo Ligo de Nacioj, povus disvolvigi la ideojn pri interkompreniĝo de la landoj, paco kaj respeto al la internacia juro, kiuj naskiĝis post la unua mondmilito. Bedaŭrin de post multaj fiaskoj la laboro de la Ligo de Nacioj ne estis tro fruktoplena kaj sia morto, okaze de la dua mondmilito, okazigis la naskon de la nuntempa Unuiĝintaj Nacioj.

La tiutempa esperantistaro, oni parolas pri la jaro 1920, vidis en tiu novkreita internacia organizo taŭgan ejon por disvastigi Esperanton. Ĉi tiu celo estis plenumota ĉefe dank' al la agado de la svisa samideano S-ro Edmond Privat. E. Privat loĝis en Ĝenevo la urbo elektita kiel sidejon por la Ligo de Nacioj, li kelkaj jaroj antaŭe vojaĝadis tra multaj landoj vizitante diversajn elstarulojn por disvastigi Esperanton.

Dank'al siaj vastaj konoj pri franca kaj angla lingvo kaj siaj gravaj kontaktoj ebligis al li la bori kiel ĉeftradukiston en la diskutoj, la tasko noti la ĉefajn ideojn kaj poste refari francen la paroladon koplodante redoni ne nur la sencon, sed ankaŭ la kon-vikon, la fortecon kaj la elokventecon de la parolinto estis laboro treege laciga, sed ĝi kaŭzis amikecon kun tiuj famaj homoj kaj eĉ privataj kontaktoj.



Multaj el la nacioj reprezentataj en Ĝenevo, pro monrimedaj aferoj, elektis fremdulojn por ilin reprezenti ĉe la Ligo, esprimante ili la ideojn de la koncerna Stato. Tiamaniere Privat fariĝis honora konsilanto kaj pli poste vicdelegito de Persujo, post dujara amikeco al la ĉefdelegito de tiu lando, Princo Arfa. Privat eĉ akceptis la peton labori kiel vicdelegiton senpage, kondiĉe ke li ricevu permeson defendi Esperanton, se la problemo pri la mond lingvo estos tuŝita ĉe la Ligo. La Registaro de Persujo akceptis la peton.

Krome Edmond Privat trovis kelkajn interesitojn ĉe la nova internacia organizo, ĉefe S-ro Lafontaine, vicprezidanto de la Belga Delegitaro, kaj la norvega Nansen. Dank' al la strebo de Lafontaine kaj Privat oni subskribis rezolucion favoran al la disvastigo de Esperanto kiel utila vehiklo por faciligi la interpopolajn rilatojn. Kompreneble ĉi propono trovis same

kelkajn kontraŭaj opiniojn, ĉefe la franca delegito S-ro Hanotaux kiu protestis laŭte kontraŭ la propono ĉar laŭ li "ekzistis jam unu monndolingvo kiu rajtas glori pri sia rolo en historio kaj kulturo: la franca lingvo". Bedaŭrinde pro la manko de fortaj apogoj la rezolucio fine ne estis aprobata. En 1921 denove oni kolektis subskribojn por nova rezolucio favore al Esperanto. Denove komisiono ekzamenis la proponon kaj decidis rekomendi al la plena kunsido ke ĝi ordonu al la Ĝenerala Sekretario enketi pri la disvastigo de Esperanto kaj raportu la sekvontajn jaroj. Por plenumi ĉi peton estis elektata S-ro Inazo Nitobe, japana delegito, kiu estis simpatianto al la lingvo, li eĉ ĉeestis al Universala Kongreso de Esperanto.

La enketo ne sukcesiĝis inter la Registaroj de la Stato-membroj de la Ligo kaj pro tio la esperantistaro aranĝis ene de la Internacia Oficejo pri Edukado interŝtatan konferencon pri instruado de Esperanto en la lernejoj, kiu estis inaŭgurata de la Sekretario de la Ligo de Nacioj. Dank' al tiu renkontiĝo la Ĝenerala Sekretario eltiris tre valorajn faktojn por sia raporto kiu estis diskutota dum la tria ĝenerala kunsido de la Ligo.

La komisiono diskutis la enketon, la informo ricevis atakon ĉefe de la reprezentanto de Brazilo kaj Francio kaj defendoj de la Brita delegito. Fine oni akceptis kompromison, la Ĝenerala Kunsido akceptus la raporton kun ĝiaj favoraj konkludoj por Esperanto, sed ĉi decido samtempe estis sukceso por nia movado, pro la fakto ke la internacia lingvo ricevis apogon kaj agnoskon ĉe monda organizo, sed ankaŭ estis danĝero ĉar la franca delegito enmetigis en la rezolucion frazojn deklarante ke malgraŭ la ebla estonta sukceso de mondolingvo la Ligo de Nacioj preferas rekomendi la instruon de fremdaj nacilingvoj.

Estu utila ĉi artikoleto por elstari la laboron de tiuj pioniroj, inter kiuj elstariĝas S-ano EDMOND PRIVAT, kies naskiĝo okazis ĝuste antaŭ jarcento, kaj kiu komprenis kaj klopodis komprenigi la valoron de Esperanto ĉe unu el la unuaj internaciaj organizoj.

GRAVA LASTA INFORMO !

Nia madrida samideano Jorge Camacho Cordón atingis ĉi-jare la premion de la Universala Esperanto-Asocio al la plej bona eseo, pro sia laboro pri la temo "Romanoj originale verkitaj en Esperanto".

Menciindas ke ĉi eseo estis unuafoje legita sub la serio "NUN TEMAS PRI..." de la 6a Andaluzia Kongreso de Esperanto en Jerezo en 1988.

RAPORTO PRI LA AGADO DE A.E.U. * DEC'88/OKT'89

Okaze de la pasinta Ĝenerala Asembleo de la Andaluzia Esperanto-Unuiĝo la Estraro prezentis raporton pri la agado de nia asocio dum la periodo Decembro '88 / Oktobro '89. Ni provas prezenti resumon de tiu raporto kune kun la financa bilanco de nia asocio dum ĉi tiu periodo.

* Administrado: En la pasinta Kongreso oni sanĝis kelkajn iujn artikolojn de la Statuto. Do, oni devis prezenti la novan Statuton ĉe la Intern-afera Departmento de la Andaluzia Registaro, kiu post kelkaj malkonsentoj aprobis definitive la novan redakton. Same oni atingis de la Ekonomia Ministerio la novan identifik-karton de AEU. Nia asocio malfermis konton ĉe la Poŝta Kaso, pere de tiu konto ni intencas faciligi la pagojn al nia asocio.

Rilate la nombro de membroj de nia asocio nuntempe ni havas 187 membrojn, tamen la nombro de tiuj kiuj akurate pagas la kotizon ne estas tre kontentiga. Dum tiu tempo la Estraro de nia asocio klopodis respondi la leterojn ricevitaj kiel eble plej rapide kaj havi efikan info-servon por tiuj kiuj perletere volis koni iun detalon pri Esperanto, la movado aŭ nia asocio mem.

* Kultura Agado: La ĉefa agado de nia asocio ĉi-kampe estis la okazigo de konferenco pri la temo "Traduko de la Lorka Verkaro en la Internacian Lingvon Esperanto" de nia samideano Miguel Fernández Martin, kune kun la donaco de la ĝis nun tradukitaj verkoj de Lorca en Esperanto al la Domo-Muzeo de Federico García Lorca en Fuente-Vaqueros (Granado).

* Kursoj: Nia asocio oferis ĉian helpon al tiuj kursoj okazitaj en Andaluzio organizataj de la lokaj grupoj pere de koresponda servo, validigo de diplomoj kontaktante kun ILEI, ktp. Rilate la korespondan kurson oni komencigis novan etapon de ĉi kurso, ĉi-foje gvidata de nia samideano Julio Herrero Seguro. Oni propagandis ĉi kurson pere de lokaj kaj regiona ĵurnaloj. La rezulto estas kontentiga kaj nun kelkaj personoj lernas la internacian lingvon pere de la koresponda kurso de AEU.

* Revuoj: La revuo GAZETO ANDALUZIA aperis dufoje dum ĉi tiuj monatoj, la kontentiga numero estus 3, tamen ni devas aserti ke la kvalito de la revuo treege kreskis, kvankam estos necese serĉi pliajn kun laborantojn, akuratigi la aperadon kaj se eble malmultekostigi la eldonadon pere de subvencioj. Rilate la monata informilo MONATE ĈE VI, ĉi-jare aperis dumonate, la preskvalito estis afero plie prizorgata kaj la enhavo estis sufiĉe interesa.

* Subvencioj: Elstarendaj estas la streboj de niaj du samideanoj Antonio González Alvarez de Torokso kaj Francisco José Nieves Pavón de Jerezo, kiuj atingis du subvencioj por la asocio, nun enspezitaj sed atingitaj la unua fine de la Toroksa Kongreso en 1987 kaj la dua okaze de la Jereza Kongreso pasintjare. Dank' al ĉi enspezoj oni povas garantii la vivon de nia asocio. En la monato Marto ni petis subvencion al la Kultura Departmento de la Andaluzia Registaro kadre de monhelpoj disdonontaj inter la revuoj de kulturaj asocioj, ni prezentis nian projekton por subvencii GAZETO ANDALUZIA-n, tamen ni ricevis nean respondon.

* Ekspo '92: Kvankam ni konscias ke nia ĉeesto al ĉi tiu Universala Ekspozicio okazonta en Seviljo en 1992 estos tre modesta, ni volas organizi ion, por plenumi tion ni pretendas kontakti kun la respondeculo de la paviljono de UNESKO en la Ekspozicio. Samen dank' al la streboj de nia samideano Tomas Caspe oni atingis la akcepton de la Organiza Komitato de la Ekspozicio por publikigi broĉuron pri ĝi en Esperanto. Ĉi broŝuro aperos post kelkaj monatoj kaj estos dissendata tutmonden.

La Sekretario de AEU.

FINANCA RAPORTO DE AEU * Periodo Dec '88 / Okt' 89

La ekonomia bilanco de nia asocio dum la periodo Dec'88 / Okt'89 prezentas jenan staton:

ENSPEZOJ

Favora Saldo je 01-12-88	3.726 R
Jereza Subvencio	60.000 R
Toroksa Subvencio	60.000 R
Membro-kotizoj	20.000 R
Pruntedono al la Koresponda Kurso ..	50.000 R
ENTUTE :	193.726 R

ELSPEZOJ

Eldonado de GAZETO ANDALUZIA	33.000 R
Eldonado de MONATE CE VI	15.441 R
Administraj Pagoj	7.500 R
Koresponda Kurso	14.651 R
Aĉeto de sonbendigilo por la kurso .	20.800 R
ENTUTE :	91.392 R
Favora Saldo je 12-10-89 :	102.334 R
	193.726 R

La Kasisto de AEU

V°B° La Prezidanto

DECIDOJ DE LA 7-a ANDALUZIA KONGRESO DE ESPERANTO

La Ĝenerala Asembleo de AEU renkontiĝis de la 12-a ĝis la 15-a de Oktobro en Torokso (Malago) okaze de la 7-a Andaluzia Kongreso de Es-- peranto. Kiel oni planis ĉi kongreso utilis kiel labor-tagoj por difi- ni la agad-planon de AEU por la venonta jaro, pli ol por amuzigi la ĉeestantojn, kvankam ankaŭ oni intencis okazigi distran programon pere de malgranda ekskurso, ludoj, video-filmoj kaj amikeca etoso.

La diskutoj de la abundaj aferoj okaziĝis dum 4 sesioj en la 3 ta goj. La plej gravaj decidoj estas jenaj:

★ <u>REVUO:</u> Daŭrigi la eldonadon de GAZETO ANDALUZIA, la nuntempa direktoro informis pri la ebleco plibonigi la presan kvaliton. Same li respondencis pri la onta akurata apero. Rilate la kunlaborojn la asocio alvokas ĉiujn interesitojn kunlabori kiel ajn en la revuo. Dum 1990 oni strebos aperigi 5 numerojn.

Pri MONATE ĈE VI ĉi revuo aperos monate dum 1990, tamen urĝas la peto al ĉiuj interesitoj sendi malgrandajn informojn ĉar nur tiel oni povos sukcesigi la eldonadon.

★ <u>SUBVENCIOJ:</u> Estas necese peti monon kien ajn, ĉar nur la oficia la monhelpo povos certigi la plenumon de niaj taskoj. Oni proponis kel kajn manierojn, krom la subvenci-petoj, por ricevi monon de la Stato. Tiel ni petos helpon ne nur al la Andaluzia Registaro sed ankaŭ al or ganismoj kiel la Ekspo'92.

★ <u>SOMERA LERNEJO:</u> AEU organizos dum Julio aŭ Aŭgusto de 1990 en Seviljo Someran Lernejon por 10/15 gelernantoj. La celo de ĉi kurso estas perfektigi la E-sciadon kaj parol-kapablon de niaj gesamideanoj pere de perfektiga kaj intensa kurso. La kurso daŭriĝos unu semajno, oni faciligos senpagan restadon al la gelernantoj, kaj se eble eĉ la manĝado. Por atingi la celon de la kurso oni invitos elstarajn profe- sorojn kaj gelernantoj kun elementa aŭ meza kono de la lingvo. La or- ganizado de ĉi kurso okaziĝos nur se tio ne provokas grandajn elspe-- zojn al AEU.

★ <u>INTERNACIA RENKONTIGO:</u> La reprezentanto de Torokso proponis la organizadon de Internacia Amikeca Renkontiĝo por tiuj esperantistaj turistoj kiuj deziras somerumi trankvile kaj malmultekoste en la Suna Marbordo. Por tio li jam konversaciis kun la estro de la Restadejo de Torokso kiu akceptis gastigi la vizitontojn. Kune kun la restado kaj la distro en la plaĝo, estos necese organizi allogan programon kun vi zitoj, ekskursoj, E-agado, ktp. Ĉi semajno okazos en Oktobro dum la antaŭa semajno al la Andaluzia Kongreso.

★ **KURSO PER RADIO:** Andrés Martín prezentis projekton ellaborita de li pri elementa kurso per radio. La Asembleo decidis ke oni studos la projekton kaj se ĝi taŭgas oni sonbendigos ĝin, ĉar kelkaj radio-elsendejoj emas programi kurson de Esperanto.

★ **LERNOLIBRO:** Por solvi la nuntempan mankon de la lernolibro ĝis nun uzata de AEU, t.e. tiu de Jorge Hess, la Asembleo decidis pristudi la eblecon eldoni sian propran lernolibron por la kursoj. Oni komisias al S-ano Andrés Martín por ke okaze de la venonta asembleo li prezentu la bazojn de la lernolibro.

★ **EKSKURSOJ:** Por plie dise disvastigi la lingvon kaj interamikigi la AEU-membraron la Asembleo decidis daŭrigi la ekskursojn organizataj de ni mem, kaj jam komencitaj pasintjare. La eblaj ontaj ekskursoj okazos al la Natura Parko Donjano kaj al la konstruaĵoj de la Universala Ekspozicio de Seviljo.

★ **MEMBRARO:** La Asembleo admonas ke estas necese por nia asocio atingi 200 membrojn por la venonta jaro, ĉar nur el tiu numero estas eble agadi efiki. Same estas necese ekigi kampanjon por atingi ke preskaŭ ĉiuj niaj membroj pagu siajn jarajn membro-kotizojn.

★ **VENONTA KONGRESO:** Oni decidis daŭrigi la organizadon de la Kongresoj en Torokso, ĉar ĉi tie ni disponas je trankvila kaj malmultekosta restadejo. Same oni decidas ke la venontaj kongresoj, kiel ĉi tiu okazita ĉi-jare, estos labor-tagoj kaj ne nur distraj vakanc-tagoj, do la distran agadon okazonta oni organizos nur se la programo tion ebligas kaj se tio ne supozas multajn elspezojn aŭ multe da laboro.

★ **DANKEMO:** Fine oni decidis danki al la organizantoj de ĉi tiu sukcesa kongreso, kaj ĉefe al nia s-ano Antonio González Alvarez, pro lia dediĉo kaj laboro gastigi kiel eble plej komforte al ĉiuj ĉeestantoj.

ATENCION

Todos aquellos miembros de AEU que no hayan satisfecho aún la cuota de 1989, (1.000 Pts) les comunicamos que el próximo número de *GAZETO ANDALUZIA* lo recibirán contra reembolso de esa cantidad más gastos de envio.
Rogamos a todos ellos que hagan efectivo dicho pago tan pronto como reciban el presente número ingresando 1.000 Pts en la cuenta corriente de la Caja Postal nº 13.837.147 a favor de ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO.

ANONCO

Se comunica a todas aquellas personas interesadas en hacer aparecer anuncios en las páginas de esta revista que *GAZETO ANDALUZIA* es una publicación abierta a todos aquellos que deseen utilizarla para la difusión de sus productos, servicios o actividades.
Por ello damos a conocer el siguiente índice de tarifas:

* 1 Página ..... 2.000 Pts
* ½ Página ..... 1.000 "
* ¼ Página ..... 500 "

Por la aparición de 3 anuncios en números seguidos sólo se pagan 2.

ANDALUZIA
POEZIO

ROMANCO PRI LA NIGRA TRISTO

Pikaj bekoj de la kokoj
serĉe al aŭroro fosas,
kiam de obskura monto
venas Soledad Montoya.
Je ĉevalo kaj je ombro
sia kupra karn' odoras.
Brun-ambose la du mamoj
ĝemas for kanzonon rondan.
- Kiun, Soledad, vi serĉas
sola kaj en denso nokta?
- Tio nur al mi koncernas.
Kial vi ne min ignoras?
Mi feliĉon mian serĉas,
la personon a mi propran.
- Soledad de mia penso,
se ĉevalo tro galopas,
ĝi al maro fine venas,
kaj en ties akvo dronas.
- Ne parolu pri la maro,
ke la nigra tristo fontas
el la teroj oliv-arbaj
sub folioj murmur-sonaj.
- Soledad, kiel vi tristas!
Kia tristo koro-rompa!

Vi en vana buŝ-atendo
sukon de citrono ploras.
- De la forno ĝis la lito
mi kuradas kiel fola,
kaj la du har-plektoj dume
svingas sin al planko doma.
Kia tristo! Karno, vestoj
iĝis jam gagato-tonaj.
Ve, miaj ĉemijoj linaj!
Ve, miaj femuroj rozaj!
- Soledad, en alaŭd-akvo
al vi faru lavon korpan,
kaj en paco vian koron
lasu, Soledad Montoya.

Kantas sube la rivero:
franĝo firmamento, fronda.
Pere de kukurbo-floroj
nova luno jam sin kronas.
Tristo, ve, de la ciganoj!
Tristo pura, ĉiam sola!
Tristo de subtera fluo
kaj de mateniĝo fora.

FEDERICO GARCIA LORCA

$E = m c^2$ . . scienca paĝo

Ĉu vi pripensis la demandon kaj respondo pri fizikajo, kiuj ape-- ris en antaŭa numero? Temis pri la tempo kiom daŭras la supreniro kaj la defalo de objekto lanĉita supren sur nia planedo. La vera respondo estas alia: se oni lan-- ĉas objekton supren, la "libera su preniro" daŭros tiom kiom la "li- bera defalo".

Kompreneble oni devas interkon- senti pri terminoj antaŭ ol disku ti pri ia afero, kaj precipe pri scienca demando; do ni komencu per difinoj: ni konsideru la "su- preniron" ekde la momento kiam o- ni ekmaltenas la objekton ĝis ki- am la objekto haltiĝas, kaj la "defalon" de tiam kiam la objekto ekfalas ĝis kiam atingas la alte- con kie komencis la difinita "su- preniro". Ambaŭ movoj estas "li-- beraj", signifante per tiu adjek- tivo ke la nura forto kiu kaŭzas/ modifas tiajn movojn estas la te- ra gravito. Vidu ke ni ne konsid- ras la impulson kiun oni donas al la objekto, ĉar estas momenta for to antaŭa al la movo, laŭ nia di- fino.

Laŭ Newton kaj eĉ laŭ Einstein (se oni ne estas superhoma lanĉan to) ambaŭ movoj estas tute sime-- triaj. Per la antaŭa impulso oni alportas nur komencan rapidecon al la objekto, kaj la tempo de am baŭ movoj nur dependas de tiu ko- menca rapideco kaj la spaco trai- rita. Konsultu iun ajn baza verko pri fiziko.

Eĉ se oni difinas tiujn movojn alimaniere, oni ne pravigas la respondon aperinta en la antaŭa numero. Se ni konsideras la su-- preniro ekde ni tenas la objek-- ton kaj impulsas ĝin ankoraŭ te- nante ĝin dum kelkaj metronoj, la supreniro estos pli aŭ malpli longa ol la defalo, depende de la rapideco de tiu "impulso" ne fizikiste difinita, rilate al la "libera defalo" tra tiu "impulsa intervalo". Tio ne estas strang- ĵo, sed simpla konsidero, kiun ni ne plutraktos.

Bone, post tiu necesa rimarko, ni rakontos al vi fabelon kiu montras al ni ke gravito atingas al ĉio kaj ĉiuj, eĉ al supreni-- ranta objekto.

"Iutage ĉasisto iris ĉasi simi-- ojn. Baldaŭ li trovis unun, kiu trankvile sidis sur arba branĉo. La ĉasisto ne estis bona fiziku- manto, kaj li pensis, ke celante rekte al la simio, li certe tra- fus. Sed la simio estis vidinta la ĉasiston, kaj dum tiu celis al ĝi, la simio pensis kviete ki on fari. Ĝi decidis lasi la bran ĉon ĝuste kiam ĝi vidus la ĉasis tan fingron premi la pafrisorto, kaj pensis ke la pafilo ne atin- gus ĝin.
Tiel, paf! saltis... simio mor-- ta! La ĉasisto estis surprizata sed kontenta, kaj li komprenis sian eraron. La simio estis mor- ta, kaj ne havis tempo por kom-- preni ke ĝi eraris" (D. Bryant).

→ →

Kio okazis? La simio same kiel la pafilo akceliĝis malsupren ĝuste en la sama kvanto: 9'8 m/s. Same kiel nia objketo malakceliĝis dum la supreniro ĝis sia rapideco nuliĝis (akcelo kun kontraŭa direkto: -9'8 m/s), kaj same kiel nia objekto falante akceliĝis.

Francisco José NIEVES PAVON

★ ★

ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

ORGANIZAS

SOMERA ESPERANTO - LERNEJO n

TRIVIDAD SORIANO

Celante la perfektigon de la kono de la internacia lingvo kaj la fluan parol-kapablon de la andaluzia esperantistaro.

BAZOJ

* Rajtos partopreni 10/15 geesperantistoj scipovantaj, almenaŭ element nivele, la internacian lingvon Esperanto. Prefere oni akceptos andaluziajn gesamideanojn membroj de AEU, tamen tio ne estas nepra kondiĉo.

* La ĉeestantoj devos pagi aliĝkotizon kiun oni fiksos estontece, ekzistos unu aŭ kelkaj stipendioj kiuj ebligos la senpagan aliĝon.

* La kurso daŭriĝos unu semajno, okaziĝos en la monato Julio aŭ Aŭgusto en Seviljo. La klasoj okaziĝos dummantene kaj la vespero utilos por la praktikado, amuzado kaj libera tempo.

* AEU prizorgos la restadon de la ekster-seviljaj ĉeestantoj, prefere ĉe restadejo aŭ ĉe gesamideanoj. Se tio estus eble AEU ankaŭ prizorgos la manĝadon, tamen ĉi tio ne estas certa afero.

* La sukcesontaj gelernantoj ricevos diplomon de AEU kaj ILEI.

* Pli detalaj informoj aperos en la venontaj numeroj de la informiloj de AEU.

NUN NI

**** JUNULARA AĻĐONAĴO AL GAZETO ANDALUZIA *****

* AEJ-OFICIALIGO

Pro la nea respondo de la Andaluzia Registaro al nia peto leĝigi la Andaluzia Esperanto-Junularon, estis necese sanĝi kelkajn artikolojn de nia statuto. Promesite ke depost Januaro ni estos tute leĝa asocio. Petojn kaj sugestojn por onta agado ni ricevos tutĝoje.

* ANDALUZIO EN KONCIZE

Ni ekkontaktis kun la eldonanto de la revuo KONCIZE por pristudi la eblecon eldoni andaluzian paĝon en ĉi tiu eŭropa revuo. KONCIZE estas gazeto kiun publikigas kelkaj eŭropaj junularaj E-grupoj. Se oni akceptas nian peton venontjare eblos vidi AEJ-paĝon en KONCIZE.

* AEJ KAJ HEJS

AEJ subskribis antaŭ du jaroj akordon kun HEJS por oficialigi AEJ-n kiel federaciiĝintan asocion de HEJS. Kio okazis al ĉi akordo? Kio okazis al HEJS? Ni respondos nur al la unua demando. La Hispana Esperantista Junulara Societo nuligis la kontrakton pro la fakto ke sia nova estraro ne konsideris federaciiĝintajn asociojn al la regionaj grupoj ĉar nuntempe HEJS estas centrisma asocio. HEJS nun vere stagnas kaj ĝi agadas nek nacie nek internacie. Ni ŝatus vidi baldaŭ fortan hispanan asocion kie la regionaj kaj naciaj asocioj ludos efikan laboron. Ĉu ne eblus strukturigi HEJS same kiel estontece HEF, t.e. laŭ aŭtonom-komunumoj?


* PERFEKTIGA KURSO

Tre interesa estas la ideo aranĝi kurson kiu celas perfektigi la parol-kapablon de la andaluzia esperantistaro. Ĉi tiu kurso sendube taŭga por la junularo, pro la fakto ke la profesoroj kaj la etoso estos sendube junaj, same pro la ĉipa kosto, la restado estas senpaga kaj eble la manĝado. Pro tio legu atente la anoncon kiu aperas sur la paĝo apuda, atendu venontajn pli detalajn anoncojn, aŭ rekte adresu al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

* UEA JUNULAR-DELEGITECO

Ĉu vi volas esti Junular-Delegito de la Universala Esperanto-Asocio en via urbo? Por plenumi ĉi postenon nur estas necese esti malpliaĝa ol 31-jara, ricevi la revuon ESPERANTO kaj esti membro de UEA almenaŭ de antaŭ unu jaro. Se tio interesas al vi kontaktu kun ni. AEJ Poŝtkesto 611. E-14080 CORDOBA.

KRUCVORTENIGMO



Pro la preskaŭ samtempa apero de la numeroj 23a kaj 24a de la revuo *GAZETO ANDALUZIA* ni prokrastigas la donacon de la premio por la solvanto de la krucvortenigmo. Memoru ke inter la solvantoj de la pasinta krucvortenigmo ni lotos la libron "AKSTERIKS' LA GAŬLO". Por tiuj kiuj sukcesos solvi ĉi krucvortenigmon ni lotos la libron "LA NIGRA INSULO" de Tinĉjo. Kion vi atendas por sendi jam la solvojn.

GAZETO ANDALUZIA

FUNDADA POR D.JOSE GARZON RUIZ en San Fernando (Cádiz) 1910.
Organo Oficial de la Asociación Andaluza de Esperanto.

EDITA: ASOCIACION ANDALUZA DE ESPERANTO. REDACCION: C/ SOL 75 41003 SEVILLA
DIRECCION POSTAL: Apartado 12.209. 41080 SEVILLA. TELEFONO: 95-441-58-54
DEPOSITO LEGAL: MA-1.136/86. IMPRIME: COPYUR. Cuesta del Rosario 14 SEVILLA
DIRECTOR: José María RODRIGUEZ HERNANDEZ. REDACTORES: Francisco José NIEVES PAVON. Pedro José GOSALVEZ OLMO.

DIRECCIONES DE INTERES

Asociación Andaluza de Esperanto
Andaluzia Esperanto-Unuigo
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación Andaluza de Esperanto
Apartado 12.209. 41080 SEVILLA

Grupo de Esperanto de MALAGA
Apartado de Correos 3275
29080 MALAGA

Asociación SEVILLANA de Esperanto
C/ Sol 75 41003 SEVILLA

Asociación CORDOBESA de Esperanto
Apartado 611 14080 CORDOBA

Grupo Esperantista de JEREZ
Apartado 320 JEREZ (Cádiz)

Grupo Esperantista de TORROX
Apartado 13 TORROX (Málaga)

Grupo Baha'i de Amistad Esperantista
Apartado de Correos 280
LA LINEA DE LA CONCEPCION (Cádiz)

Asociación Sevillana de Jóvenes
Esperantistas
C/ Sol 75
41003 SEVILLA

Sección Andaluza de Jóvenes
Esperantistas
Apartado de Correos 611
14080 CORDOBA

Curso de Esperanto por Correspondencia
Apartado de Correos 864
29080 MALAGA

ENHAVO

PAGO

Cefartikolo 1
Informoj 2
Traduko de Lorca en Esperanton 3
Esperanto kaj Ligo de la Nacioj 6
Agado de AEU dum 1989 . 8
Raporto pri la decidoj de la Toroksa Kongreso. 10
Andaluzia Poezio 12
$E=mc^2$ * Scienca Paĝo ... 13
Somera E-Lernejo 14
Nun Ni 15
Krucvortenigmo 16

esperanto,
internacia lingvo

DEPOSITO LEGAL MA-1.136/86


SEGURA-MONTARO
KONDADO
HOESKARO
VELEZO
RIVERO
NACIMIENTO
KAZORLA-MONTARO
ALHANZORO
SUPRA ANDARAKSO
BAZAO
TABERNAS-KAMPARO
SUBA ANDARAKSO
DALIAS-KAMPARO
NIAAR-KAMPARO
LA LOMO
MAGINO
ADIKSO
ALPUJAROJ
IZNALJOZO
GRANADA VALO
LEKRIN-VALO
GOAAARO
SUDA KAMPINJO
SUDA MONTARO
ALHAMO
NORDA KAMPINJO
MONTEFRIO
AKSERKIO
ANTEKERO
GOADALORCO
RONDA-MONTARO